

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

N-o 49, 11. sept. 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

Esperantista Helpo por Malsatanta Ruslando.

(Vidu alvokon sur paĝo 2.)

Helpo al „Esperanta Ligilo“.

Al nia alvoko en n-o 46 respondis ĝis nun nur malmultaj legantoj. Donacoj alvenis de:

- | | |
|---------------------------------------------------------------------------------|---------|
| 1. Luis Santamarina Pedrayo, Policingestoro, Rabasa 45-4-3, Barcelona (Hispana) | 25 mk. |
| 2. Antonio Santamarina Pedrayo, Direktoro de Karcero, Teruel (Hispana) | 25 mk. |
| 3. Esp. Grupo Neustadt (Supra Silezio) | 30 mk. |
| 4. V. Bonde, Falun (Svedo), Stenslund 2 | 7 mk. |
| 5. Esp. Grupo „Verda Stelo“ Weiden apud Köln (Germ.) | 13 mk. |
| Entute | 100 mk. |

La donacintoj povas esti certaj je la sincera danko de la malfeliĉaj blindaj samideanoj.

Ni volas ĉi tie ankoraŭfoje klarigi la situacion. Dum la kongreso de Praha estas akceptita rezolucio, laŭ kiu la esp. asocioj kaj grupoj kaj la esp. gazetoj aranĝu monokolekton por subteni „Esperantan Ligilon“, la monatan tutmondan revuon de la blindaj gesperantistoj kaj solan lumradion en la nokto de multaj blindulaj koroj. Konforme al tiu ĉi rezolucio, ni petas niajn legantojn, ke ili sendu al la administracio de ET respondkuponon aŭ monbiletojn kun rimarkigo, ke la sumo estas destinita por „Esperanta Ligilo“. Precipe, pagante la abonprezon, la abonantoj bonvolu krompagi malgrandan sumeton, eble 10% por subteno al „Esperanta Ligilo“.

La nomoj de tiuj, kiuj donacas minimume 5 resp.-kup., 5 germ. mk., 1 fr. fk. aŭ korespondan sumon en alia valuto, estas publikigataj en ET.

Unu lingvo internacia por ĉiuj.

(Al la Esperantista Kongreso.)

De S. Hirshhorn, deputito en Pola Sejmo.

Ekstere ŝajnas iom strange, ke en tempo de akra ŝovinismo troviĝas „naivaj idealistoj“, kiuj predikas la interfratiĝon de ĉiuj nacioj, kiu konsistas en akcepto de unu lingvo. Sed se ni pli

profunde observos la hodiaŭajn kondiĉojn, ni konvinkigos, ke neniam ankoraŭ la esperantista movado estis tiel aktuala kiel en la nuna tempo de reŝoranta nacismo. La Esperantismo jam de longe eliris el la utopia stadio, kiam ŝajnis, ke ne estas malfacile anstataŭi la naciajn lingvojn per unu tutmonda lingvo.

Nun la Esperantismo plenumas pure-praktikajn kaj realigeblajn celojn. Ĝi deziras disvastigi inter diversaj nacioj lingvon, per kiu ili, ne forigante siajn naciajn lingvojn en interna ŝtata vivo, povu interkompreniĝi en internacia vivo. Tiu ĉi celo fariĝas nun la plej urĝa kaj postulas tujan efektiviĝon.

Verdire, antaŭ la milito en la tempo de venka imperiismo multe da homoj iluziis, ke la problemo de reciproka interkompreniĝo inter nacioj estos solvata sen internacia lingvo. Politike preskaŭ la tuta mondo estis dividita inter kelkaj grandaj imperioj, kiuj uzis ankoraŭ pli malgrandan nombron da „internaciaj lingvoj“. En Anglio kun ĉiuj ĝiaj kolonioj kaj en Ameriko la reganta lingvo estis la angla. En Francio kaj en ĝiaj kolonioj regis la franca lingvo, kiu ankaŭ estis la gepatra lingvo de multe da enloĝantoj de Kanada lando, estis opiniata kiel diplomata lingvo kaj havis multajn adeptojn en intelektaj rondoj de la tuta mondo. La germana lingvo regis en Germanio kaj Aŭstrio. La konkurado inter la lingvoj tial ne estis granda. Al instruita homo estis sufiĉe scii la tri ĉefajn lingvojn. La supre cititaj imperioj intencis disvastigi per la asimila procedo sian influon je vastaj rondoj kaj post tempo elpuŝi ĉiujn apartajn naciajn lingvojn. Escepte por Rusio oni pensis fari cedon, al kiu oni transdonus la asimilan agentecon je ĉiuj slavaj landoj.

Ankaŭ la problemo de ekstera interkompreniga lingvo estis pli facila, ĉar tiaokaze konkurso inter si nur du lingvoj: la angla per sia disvastigiteco inter la plej granda nombro da homoj kaj la franca kiel la tradicia kaj la plej malnova lingvo de la tutmonda inteligentularo.

Nun post la milito en la mondo fariĝis radikala ŝanĝo. Subjugitaj nacioj estiĝis memstaraj. Interne de la novaj ŝtatoj troviĝas naciaj malplimultoj, kiuj parolas siajn apartajn lingvojn. Tre ofte en la ŝtato tute ne ekzistas supereco, sed kunestariĝo

de kelkaj egalnombraj nacioj, kaj estas absolute maleble difini unu ŝtalingvon eĉ por internaj ŝtataj institucioj, kiel la parlamento, ktp. Same celas diversaj malgrandaj ŝtatoj, pro politikaj motivoj, al kunligo inter si (federacio) por kune aranĝi certajn ŝtat-funkciojn, kio ree postulas unu interkomprenigan lingvon; sed la nacia konkurado neniam konsentos favori unu lingvon kaj malrespekti alian.

Kaj la grandaj imperioj kun siaj „tutmond-lingvoj“? Ankaŭ el ili fariĝis ruino. La procedo de naciligismo ankoraŭ ne finiĝis kaj troviĝas en floranta disvolviĝo. Rusio estas jam parte dividita en memstaraj ŝtatoj, kaj la resto baldaŭ sekvos. Eĉ la principe asimila Sovjet-Respubliko estas devigata doni al diversaj nacioj kultur-liberecon. Aŭstrio disfaliĝis. Germanio ĉesis esti mond-potenco. En la anglaj kolonioj kreskas la nacia separatismo, kaj la ekzemplo de Kanada lando kaj de Aŭstraliaj provincoj montras klare, ke Anglio estos devigata doni memstarecon (sub brita protektoreco) al Hindio kun ĝiaj 250 milionoj da enloĝantoj. En Egiptio kaj en Irlando oni nun faras decidan paŝon sur la vojo de aŭtonomio. Ĉio tio ĉi plimultigos la nombron de lingvoj kaj dialektoj. Eĉ en Francio, kiu estis opiniata la simbolo de nacia unueco, komencas flori „Rena“ movado, kiu konsistas en tio, ke diversaj provincoj malkonsentas kun la ĝis nun apoteozita centralismo. Ili postulas memadministracion kaj eĉ volas evoluigi la tieajn dialektojn. Estas certaĵo, ke Francio devos doni memadministracion al Elzas-Lotringaj provincoj, konsiderante la tieajn apartajn lingvojn. Francio estos sama naciarŝtato kiel aliaj landoj.

La dua procedo, kiu estas kunligita kun la lingvoproblemo, estas la demokratigismo de l' homaro. Ĉie plifortiĝas la demokrata regno. La ŝtatgvidado apartenas al la popolo, kiu volas regi senpere per la reprezentantoj de sia klaso. En la registaro sidas vilaĝano kaj laboristo, kaj tre ofte okazas, ke la prezidanto de ministraro aŭ la ministro de eksterlandaj aferoj scias nur sian gepatran lingvon.

La problemoj, kiamaniere interkompreniĝi, tial fariĝas urĝa. Kaj la interkompreniĝo inter ŝtatoj, inter nacioj en la regno mem, inter klasoj kaj

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 8-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

(82-a daŭrigo.)

Hundo, nigra hundo, pensis li maldolĉe. Mi esperis al vi kiel al amiko, al frato, kiel al propra patro. Li ŝajnis al mi anĝelo de Dio! Kaj li nur volis ĉiri miajn botojn

Kaj la malfeliĉulo iris pluen. Liaj botoj brilis kiel speculo, sed lia animo fariĝis ankoraŭ pli malluma

XIX.

Tiele li venis al la bordo de l' golfo. Ronda placo kun malgranda ĝardeneto; super la kapoj de l' pasantoj serpentumis relvojo sur kolonoj; ĵus preterflugis vagonaro, kurbigis super la golfo kaj ekrapidis pluen laŭlonge de la bordo, malaperante post la angulo de griza domo kaj jetinte sur la akvon nubon de nigra fumo.

Mateo sidigis sur benkon kaj rigardis al la golfo. La akvo movetiĝadis briletante. Nemalproksime ekfajfis vaporŝipo kaj tuj poste debordiĝis, ŝarĝita de homoj.

Lozinski senkonscie ĝin postsekvis per la okuloj. La vaporŝipo kuris rekte al la insulo, sur kiu staris la konata kupra virino. Samtempe preter la insulo malrapide veturis giganta ŝipego simila al tiu, sur kiu antaŭ nelonge alvenis niaj Loziŝĉanoj. La disetendita flago flutis en la aero kaj ŝajne sterniĝis ĉe la piedoj de la kupra virino, kiu tenis super ĝi sian torĉon

Mateo vidis la eŭropan giganton malrapide dispuŝi la ondojn per sia larĝa brusto, kaj larmoj

aperis en liaj okuloj . . . Antaŭ nelonge li sur simila ŝipego ĝis tagiĝo rigardadis ĉi tiun statuon, ĝis kiam fajroj sur ĝi estingiĝis, kaj la sunradioj komencis orlumiĝi ĝian kapon, dum Anna pace dormis, metinte la kapon sur sian paketon.

Proksime de tiu loko staras ronda nealta konstruaĵo, speco de cirka: ĉi tie ricevis rifuĝon elmigrantoj el Eŭropo, alvenintaj sur eŭropaj por-elmigrantaj ŝipegoj.

Se Mateo sciis tion, li nepre alirus pli proksime. Sed se li alirus, li povus vidi sian fratinnon Katerina, gajan, bone vestitan, ellrantan el la pordego brako ĉe brako kun sia edzo Osip Lozinski.

Osip surhavis sinjorfasonajn vestojn, tiajn, kiajn Dima portis lasttempe, tamen por Osip lia kostumo estis tute ĝustmezura kaj ne similis selon sur bovino.

Elirinte ili sin direktis dekstren laŭlonge de la bordo, al havenaj albordiĝejoj, esperante, ke eble Dima kaj Mateo alvenas sur tiu germana ŝipego, kiu ĵus preterveturis sub la statuo de Libereco.

En la sama momento ankaŭ Mateo leviĝis kaj iris maldekstren, laŭ la bordo, en direkto de la forkuranta vagonaro

Proksimume je la kvara horo ree oni vidis la strangan viron ĉe la ponto. La vagonaro ĵus venis de trans la rivero kaj faris rondturnon; amaso da amerikanoj, por kiuj la haltejo estis ĉe la ponto, nun malsupreniris la ŝtuparon; ilian atenton altiris stranga viro, staranta en la mezo de l' homa rivero kaj vokanta:

• „Kiu kredas je Dio, helpu!“

Kompreneble, neniu lin komprenis. Se en la nuna tempo iu same vokus en kia ajn granda amerika urbo, li certe trovus respondon en la

homamaso, ĉar dum la lastaj jaroj ĉiu ŝipego alveturigis Amerikon multe da rusaj regnantoj: poloj, hebreoj, duhoboroj²⁷⁾. Poste la alvenintoj disiĝas tra la tuta lando, provas kulturi teron en kolonioj, dungigas kiel komizoj, laboras en fabrikoj. Kelkaj prosperas, riĉiĝas, aliaj fariĝas terkulturistoj, kaj tiaokaze post kelkaj jaroj oni ne rekonas la hebreajn knabojn, fariĝintaj korpulentaj sanaspektaj farmbienaj laboristoj. Sed multajn ankaŭ trafas malfeliĉo; malriĉiĝintaj kaj timigitaj ili revenas en urbojn, akroĉiĝas al sia antaŭa vivmanero. Iu elmetas en sia ĉareto malbonspecajn tranĉiletojn, serurojn, alia vendas ĉiuspecajn bagatelaĵojn aŭ broŝurojn kun bildoj de Niagara, de Nov-Jorko, de la granda nord-amerika relvojo; kelkaj laborenspezas servante kiel faktoroj por siaj samgentanoj kaj por aliaj alvenantaj alianduloj. Kiam preteriras tia malfeliĉulo kun sia nenion valoranta komercaĵo, almetiĝi ktp., per kio li volas nur kaŝi sian almazolecon, — viro ĉifonvestita, netondita, malpura, kun malklara malĝajaj okuloj, — tuj laŭvide oni rekonas en li rusan hebreon, ankoraŭ pli kompatindan en fremdlando, kie la vivado estas pli multekosta, kaj la prospero ne ĉiujn trafas

Sed en tiu epoko ili ankoraŭ ne estis tiel multenombraj en Nord-Ameriko, kaj malfeliĉe por Mateo neniu el tiaj hebreoj troviĝis en la homamaso, kiam li staris ĉe la ponto kaj vokis kiel homo dronanta. Kelkaj amerikanoj haltis, mire rigardante la strangulon, kaj iris pluen. Sed kiam Mateo vidis policanon alirantan al li, li rapide retiriĝis kaj sin kaŝis en la homamaso.

²⁷⁾ Socia-religia sekto. La nomo signifas „batalantoj per spirito“ („duh“ = spirito, „bor“ = batalo).

fakoj en internaciaj kongresoj fariĝas sange necesa, ĉar sen tio la homaron minacas neevitebla pereco. Kaj favori unu lingvon estas maleble pro la konkurado. Kaj la el „malnovaj“ lingvoj estas neel-lernebla per la popolamaso, kiu ludas nun la gvidan rolon.

Jen tien ĉi alvenas helpante Esperanto — internacia lingvo, kiu estas konstruita sur la fundamento de ĉiuj ĉefaj lingvoj kaj kiu estas tre facile elernebla. Sufiĉas nur enkonduki tiun ĉi lingvon devige en la lernejojn de la tuta mondo, kaj en mallonga tempo la homaro havos la eblecon interkompreniĝi, ne forigante siajn apartajn naciajn lingvojn; kontraŭe, plifortigante sian influon en interna socia vivo.

Al tio celas la esperantistoj, kaj en la nomo de la juda enloĝantaro de Polio, el kiu devenas la genia kreinto de Esperanto kaj per kiu la interfratiĝo de nacioj estas sankta afero, ni eldiras al la batalantoj por tiu nobla ideo nian plej varman saluton.

Esperantigita el „Der Moment“
n-o 176, la 3-an de aŭgusto 1921
de J. Jurysta.

Komercaj ĉambroj.

La komerca ĉambro de Lyon unuvoĉe akceptis la 23-an de junio sekvantan rezolucion, kiu similas al la respondo de la komerca ĉambro de Budapeŝt (vidu ET n-o 34):

Konsiderante, ke el la opinio esprimita de sciencaj societoj kaj de filologiaj specialistoj rezultas, ke la lingvo Esperanto posedas ĉiujn necesajn kvalitojn de klareco, precizeco, riĉeco kaj simpleco de konstruo permesantajn ĝian alprenon kiel internacian helplingvon;

konsiderante, ke konfesante tiujn ĉi kvalitojn, same kiel la evidentan utilecon de internacia lingva kodo, kiu multe faciligus la komercajn rilatojn inter popoloj, Esperanto havas ankoraŭ nur tre malfortan disvastiĝon, ke en ĉi tiuj cirkonstancoj ĝi ne povas pretendi anstataŭiĝi la fremdajn lingvojn en la praktiko de la komercaj rilatoj, ke la studo de fremdaj lingvoj alirudiĝas do en la unua vico;

la komerca ĉambro de Lyon esprimas la deziron, ke estu kreataj resumaj kursoj, kies objekto estos limigata je lernado legi en Esperanto, kaj, se bezone, respondi al komerca letero, utiligante la esperantajn gramatikojn kaj vortaron.

Esperanto en Kongresoj.

Tria Kongreso de Tutmonda Frateco akceptas rezolucion por Esperanto.

Je la III-a Kongreso de Tutmonda Frateco (World-Brotherhood), okazinta en Praha fine de aŭgusto, estas akceptita jena propono, „ke la korespondado de ne angle parolantaj landoj kun la ĉefoficejo povas kondukiĝi en Esperanto, kaj la Kongreso ankaŭ rekomendas la formadon de esperantistaj grupoj en la lokaj grupoj de Tutmonda Frateco en ĉiuj landoj“.

La proponinto, s-o W. D. Ralph el Londono, parolis en la angla kaj germana lingvoj.

Esperanto en la Kongreso de la Internacia Unuiĝo de Junuloj por la Societo de Nacioj en Kopenhago.

La 22. aŭg. prof. Jespersen faris en „L'Internationale de la Jeunesse“ klarigan paroladon pri ldo. Neniu diskutado sekvis ĝin. Post lia foriro, inter aliaj punktoj de tagordo, fariĝis diskutado pri internacia lingvo. Germana delegito jangskate tre forte apogis la helplingvan demandon kaj diris, ke laŭ lia sperto Esperanto estas treege facila lingvo.

Poste s-o Ecker (franco) en diplomata, lerta paroladeto ankaŭ apogis la helplingvon kaj parolis pri siaj spertoj je Esperanto, rakontis pri la granda disvastiĝo de la lingvo, pri la kongreso de Praha, pri la apogo de konataj personoj kaj asocioj, aldonis ke „plibonigo ne ĉiam estas vera plibonigo“. Oni aplaudis la paroladon de s-o Ecker.

Laŭ lia propono estis kreata komisiono por studi la disvastiĝon de la du helpaj lingvoj.

La venonta kongreso okazos en 1922 en Genève. Samideanoj-junuloj, simpatiantaj al la movado, atentu.

Kongreso de la Unuiĝo de Asocioj por la Societo de Nacioj en Genève (6.—10. junio).

Laŭ „La Paix par le Droit“ (julla numero), franca pacifista ĵurnalo, franca deputito Justin Godard, malnova amiko de Esperanto, kies opinionon ET jam publikigis, prezentis raporton pri Esperanto, kies diskutado estis prokrastata ĝis la venonta kongreso.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Fondo de Pola Esperantista Asocio.

La 22-an kaj 23-an de aŭgusto okazis en Lodz kunveno de delegitaro de polaj esperantistaj societoj el diversaj urboj. Post longa kaj vasta diskutado oni decidis reorganizi la nunan Polan Esp. Societon kaj fondi Polan Esperantistan Asocion kun centra oficejo en Varsovio. Estis elektata komisiono por prilabori la statuton de tiu asocio kaj eventuale renovigi propran organon „Pola Esperantisto“, kiu depost la milito ĉesis aperadi. Plue oni decidis kunvoki en Varsovio dum 1-a kaj 2-a de novembro unuan konferencon de ĉiuj polaj esperantistoj. Oni esperas, ke dum

Al la esperantistaj organizaĵoj de ĉiuj landoj kaj al la izolaj geesperantistoj!

Karaj Gesamideanoj!

Niajn apudvolgajn regionojn vizitis terura gastro, pli terura ol epidemio, pli mortiga ol milito, pli dezertiga ol tertremo aŭ superakvego. Tiu ĉi terura gastro estas — malsato!

Malsatas pli ol dek milionoj da loĝantoj.

Por helpo al la malsatantoj ne sufiĉas nur penoj de regnaj organoj, tial al la laboro alpaŝas ĉiuj societaj fortoj de la lando. Estas organizita Tutruslanda Komitato por Helpo al la Malsatantoj, kiu laboras sub la signo de la Ruĝa Kruco.

La inicianta grupo de petrogradaj geesperantistoj organizis Tutruslandan Esperantistan Oficejon por Helpo al la Malsatantoj, al kiu ĝi komisiis, aliri al la laboro ĉiujn geesperantistojn de la tuta mondo.

Karaj gesamideanoj! Montru al la tuta mondo, ke ni ne estas nur esperantistoj-idealistoj, propagandantaj ekskluzive la ideon pri la lingvo internacian! Montru, ke ni havas ankaŭ internacian koron kaj animon, kiuj kapablas profunde senti, sed ankaŭ energie batali kontraŭ tiuj malfeliĉoj kaj mizeroj kaj venki ilin!

Faru do la plej grandan propagandon de la ideo pri helpo al la malsatantoj, tiel per organizado de specialaj lekcionoj, raportoj, vesperoj, kiel ankaŭ per alvokoj en diversaj lokaj presorganoj. Propagandu samtempe sub la signo de Verda Esperantista Stelo kaj de Ruĝa Kruco! Prenu sur vin la inician al kreado de lokaj Esperantistaj Oficejoj por kolektado de ĉiusecaj objektoj, ne ĝenante vin per la kvanto de tiuj objektoj kaj memorante, ke ĉiu peco da pano, ĉiu glaso da lakto, ĉiu peceto da sukero trafos en la buŝon de malsatanto kaj eble savos lin de kruela morto!

tiu tempo okazos ankaŭ oficiala malfermo de la nova asocio, kiu multe helpos kaj plifortigos nian movadon en Polujo. En proksimaj tagoj Pola Esp. Societo aranĝos publikan vesperon por memoro de sia antaŭ nelonge mortinta honora prezidanto A. Grabowski.

Gastas nun en Varsovio usona s-ano S. Zysk el Philadelphia. Alveturis nian urbon ankaŭ la konata pola eldonisto, s-o Jan Günter, reveninte kiel militkaptito el Ruslando; antaŭ la milito li multe helpis la esp. movadon, estante la eldonanto de Pola Esp. Gazeto.

El Budapeŝt.

La 12-an de aŭgusto s-ano d-ro T. Schwarz faris interesan paroladon en la Socia Muzeo pri la vivo de Esperanto en Ruslando, transdonante la salutojn de la moskvaj samideanoj. Li estis oficiala delegito de la rusaj esperantistoj por la XIII-a en Praha, sed laŭ reguloj de la hungaraj militkaptitejoj oni retenis lin dekkvar tagojn, kaj li alvenis post la budapeŝta postkongreso. Li rakontis pri la rezolucio de la Tutruslanda Esp. Kongreso en Petrograd, kiun oni akceptis, kvankam la plimulto de la esperantistaro ne estas komunisto. Li ankaŭ parolis pri la granda mizero kaj ĝenerala anarkio en Ruslando.

La 14-an de aŭgusto estis granda somera festeno en arbaro apud Budapeŝt aranĝita de la laborista esp. grupo. Ĉeestis kelkaj cent personoj ankaŭ allandaj gastoj, kiuj ankoraŭ restis en Budapeŝt post la postkongresaj festoj. Okazis kabaredo kun partopreno de aktoroj Baghy kaj Sarosi.

La 19-an de aŭgusto s-ano Balkanyi rakontis pri la XIII-a kaj s-ano Andreo Ĉe el Ĉiuj (Koloŝvar) pri la esp. movado en Transilvanio kaj pri la Graz'a kongreso de Ika.

La budapeŝtaj tagĵurnaloj ofte skribis pri Esperanto okaze de la diversaj kongresoj kaj paroladoj.

Popaganda vojaĝo tra Bulgario.

Ges-oj Krestanoff faris komence de aŭgusto propagandan vojaĝon tra Bulgario, vizitante la urbojn Plovdiv, Stara-Zagora, Ajtos, Jambol, Burgas, Gabrovo, Tirnovo, Sumen, Varna, Ruŝenk, Plevn, Vrach, Sofia kaj Pazarĝik. Ili estis tre kontentaj pri la samideana akcepto.

Esperanto

ĉe internacia Universitato en Bruxelles.

Franca pacifista ĵurnalo „La Paix par le Droit“ anoncas pri kursoj de Esperanto en la Internacia Universitato.

Esperanto

en Vespera Lernejo de Wood Green.

La Middlesex'a Edukada Komitato, kiu regas la algradan instruadon en la regiono ĉirkaŭ Londono, lastan vintron permesis la starigon de esp. kurso en la Vespera Lernejo (por ekslerneanoj) en la antaŭurbo Wood Green. Tiun ĉi vintron oni permesas ankaŭ kurson por studi la esp. literaturon.

Franca Asocio por Akcelado de la Sciencoj.

La sukceso de Esperanto en la kongreso de tiu ĉi asocio, atingita malgraŭ la kontraŭstaro de la prez. s-o Rateau, membro de la Scienca Akademio, (vidu ET n-o 48) estas ŝuldata al s-o Rollet de l'Isle, prez. de la Franca Societo por la Propagando de Esperanto, kiu ankaŭ ĉeestis la kongreson kiel delegito de la Ministro por Maraferoj.

Penu aliri al la afero ne nur ĉiujn geesperantistojn, sed ankaŭ iliajn amikojn kaj konatojn kaj la lokan loĝantaron! Partoprenigu ĉiujn lokajn komitatojn por helpo al la malsatantoj sub la nomo de Esperantaj Sekcioj! Ĉiun kolektitan sumon sendu per poŝto kaj telegrafo aŭ per poŝtfervojoj sendaĵoj aŭ senpere laŭ la adreso de Tutruslanda Esperanta Oficejo por Helpo al la Malsatantoj, Petrogrado, Italjanskaja n-o 31, aŭ transdonu al lokaj reprezentantoj de Tutruslanda Komitato por Helpo al la Malsatantoj; en la lasta okazo petu pri enkalkulo de tiuj aferoj en specialan Esperantan Fondon!

Plenan informadon pri ĉio, kio estos farita, ne pli malofte ol unu fojon dum semajnoj sendu al la redakcio de „Sciigoj de Tutruslanda Esperanta Oficejo por Helpo al la Malsatantoj“, Petrogrado, Italjanskaja n-o 31!

Memoru, ke ĉiu, eĉ plej modesta objekto, donota de geesperantistoj, estos samtempe bonega kaj efika propagandilo de Esperantismo; memoru, ke laŭ nia laboro, farota praktike en la tutmonda amplekso, ĉiuj popoloj juĝos pri la potenco kaj unuiĝo de niaj esp. organizaĵoj, pri la disvastiĝo de Esperanto kaj ankaŭ pri la simpatio kaj konfido, kiujn havas la geesperantistoj kaj ilia agado ĉe la loĝantaro!

Ĉiuj al la laboro!

En la nomo de Tutruslanda Esp. Oficejo por Helpo al la Malsatantoj

La Prezida Komitato:

A. G. Bikovskaja; V. N. Devjatnin; K. Mühlberg; V. A. Selivankin; G. Ĉaĉe; E. Drezen; Majnov; Dmitrijev; Radinkov/Neradov; Ambroz.

Esperanto kaj Ruĝa Kruco.

Nia nelacigebla s-ano gen. Sebert, membro de la Franca Akademio de Sciencoj kaj de la Konsilia Komitato de la Unuiĝo de Francaj Virinoj (ruĝkruca organizaĵo) verkis artikolon pri „Esperanto kaj Ruĝa Kruco“ en n-o de 15. aŭg. de „Le Bulletin de la Croix-Rouge Internationale de Genève“.

Asocio de Brazilaj Inĝenieroj por Esperanto.

„Jornal do Commercio“, la plej grava gazeto de Rio de Janeiro, anoncas en n-o de 3. aŭg., ke la 18. julio la Asocio de Brazilaj Inĝenieroj voĉdonis por la apliko de Esperanto en la tekniko.

Esperantaj Ekzamenoj.

En Nürnberg (Bavario) okazos sabaton la 24-an de septembro, p.m. je 8 h., kaj dimanĉon la 25-an, matene je 9 h.

1. ekzameno pri kapableco,

2. ekzameno pri scienca-pedagogia kapableco.

La ekzamenoj estas aranĝitaj de la ŝtata Saksa Esperanto Instituto, kies direktoro, d-ro Dietherle, mem ekzamenos la kandidatojn. Esperantistoj, kiuj volas partopreni la ekzamenojn, tuj anoncu sin aŭ ĉe la Esp. Kartelo Nürnberg-Fürth, Ostendstr. 173, Nürnberg, aŭ ĉe la Saksa Esp. Instituto en Leipzig.

Framasonio.

Universala Framasona Ligo Esperantista.

Dum la XIII-a kongreso de Esperanto en Praha okazis la jarkunveno de suprenomita ligo.

El la jarraporto pruviĝis, ke la pasinta jaro estis sufiĉe fruktodona.

La estraro eldonis tuj post la XII-a kongreso cirkuleron por kunvoki ĉiujn framasonojn esperantistajn al la disvastigo de Esperanto en la loĝioj.

La direktoro de la „Bureau International pour les relations maçonniques“ afable donis al ni unu paĝon de la internacia organo de sia oficejo, redaktata en Esperanto.

2 broŝuroj aperis: 1. „La libereco de la Konscienco kaj la Tutmonda Framasonaro“ 2. „Kio estas Universala Ko-Framasonio?“ La lasta pritraktas la gravan punkton: „La virino en la Framasonio“ kaj „la Ordeno Le Droit Humain“ kaj estas eldonata de Amsterdam'a loĝio. Du propagandaj kunvenoj pri tiuj temoj okazis en Frankfurt a. M. kaj Praha.

La unua sekcio de nia Ligo estis fondata en marto pasinta en Marseille. Vigla propagando en Leipzig, Frankfurt a. M. (Germanio), Bath (Anglio) kaj Amsterdam (Holando).

Komuniko kaj artikoloj aperis en diverslandaj framasonaj kaj esperantistaj gazetoj.

Oni decidis aliĝi al la „Fédération maçonnique“ kaj esplori la eblecon aliĝi al UEA.

Pri la jaro pasinta ni povas esti sufiĉe kontentaj, sed ni bezonas pli da helpantoj por enkonduki nian lingvon en la ĉiulanda framasonaro. Ĉiu framasona esperantisto subtenu nian movadon per ĉiuj siaj fortoj. La interna ideo de Esperanto estas ja parenca al la ideo framasona: „La Framasonio serĉas ĉion, kio povas unuiĝi homojn kaj popolojn; ĝi klopodas forigi ĉion, kio disigas korojn kaj spiritojn“ kaj Esperanto estas grava rimedo atingi tion! Helpu ĉiuj!

Por la estraro:

Frits Faulhaber, Bergerstr. 103-1,
Amsterdam, Holando.

Libera Penso.

Faka kunveno de Liberpensuloj

okazis dum la XIII-a Esperantista Kongreso en Praha, la 2-an de aŭgusto 1921. Ĉeestis 15 personoj el 5 diversaj nacioj. Je la 8.30 h. estis elektata la estraro jene: prez. s-o Schoofs (Antwerpen), sek. s-o Poppe (Pardubice, Bohemujo). La prezidanto parolis pri la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj, kiu ekzistis antaŭ la milito kaj havis sian oficialan organon kun la titolo „Libera Penso“. Li esprimis la deziron, ke tiu ĉi esp. societo estu restarigota, inter kies taskoj estus ankaŭ, propagandi Esperanton inter la liberpensuloj kaj aliflanke la liberan penson inter la esperantistoj. S-o d-ro Theilhaber (München) proponis, ke la scilgoj de la societo estu publikigitaj en la esp. gazetoj sub la fakaj scilgoj; s-oj Cross (Perpignan) kaj Grenkamp (Jaszlo) aprobis tiun ĉi postulon kaj s-o prezidanto opiniis, ke krom tiaj scilgoj ankaŭ estu presotaj fakaj artikoloj pri libera penso. Kiel kotizaĵo por la fondota ligo oni provizore akceptis la rezuman proponon de s-o Schoofs jene: jare 5 frankoj francaj aŭ 3 frankoj svisaj, por landoj kun malalta valuto transkalkulita laŭ la sistemo de UEA. Kiel regularo oni povos uzi la malnovan regularon, kiun oni petos de s-o Deshays en Parizo. Pli estis preparolata, ke la komuniko pri la kunveno estu tradukota kaj publikigota en la naciaj lingvoj de la ĉeestantoj. Fine oni decidis protesti kontraŭ la iama decido de la Ĝenerala Konsilantaro de la Ligo de Liberpensuloj, ne allasi Esperanton por la debato, kiu decido estis motivita jene: ke la lingva demando estus pli komplicita per enkonduko de Esperanto. La esp. liberpensuloj protestas kontraŭ la preteksto, ke ili intencas forigi ĉiujn aliajn lingvojn kaj postulas, ke tiu ĉi demando denove estu pritraktota; la argumentoj, kiujn oni eble povis uzi kontraŭ Esperanto antaŭ 20 jaroj, jam ne taŭgas en 1921. La konferenco finiĝis je 10.30 h.

Internacia Esp. Servo.

(En la intereso de la esp. propagando estas dezirinda, la artikolojn sub tiu ĉi rubriko traduki kaj represi en naciaj gazetoj, aldonante la vortojn „Internacia Esperanto-Servo“ kaj sendante 1-2 ekzemplerojn de la koncerna ĵurnalo al la redakcio de ET.)

LETERO EL PALESTINIO.

Haifa, 18. aŭg. 1921.

Al la Sankta Lando daŭras esti direktataj la okuloj de mahometanoj, kristanoj kaj judoj. Malgraŭ la kontraŭkonsilo de la alta komisarulo Sir Herbert Samuel, komisiono de mahometanoj kaj kristanoj veturis Londonon por provi modifi la deklaron Balfour; ĉar spite la promeson, ke la rajtoj de mahometanoj kaj kristanoj ne estu difektataj, fakte la influo de cionismo, eĉ nun antaŭ la estonta granda enmigro de judoj ĉiulanda, en publika administracio ofte kolerigas mahometanojn kaj kristanojn. Neniu dubas je la bonaj intencoj de la alta komisarulo, kiu nuntempe ĝuas sian bone merititan libertempon en Safed, unu el la sanktaj urboj de la judismo. Sed oficistoj sub influo cionista favoras la aferojn de judoj, ne favorante la aferojn de mahometanoj kaj precipe de kristanoj, kies nombro kaj financa situacio estas malgrandaj. Eĉ la propra patriarko katolika de Jeruzalemo antaŭ mallonge estis devigata plendi pri la partia agado de la cenzuro, kiu ne permesis publikigon de papa alokucio (alparolado), sed permesis gravan atakon kontraŭ ĝi. Laboristoj, terkulturistoj, komercistoj, oficistoj kaj aliaj nejudoj ofte priplendas tian mankon de senpartiteco.

Samtempe la cionistoj estas malkontentaj, ke Sir Herbert Samuel invitis oficiale ĉirkaŭ 30 eminentulojn mahometanajn kaj kristanajn por preparoli kun ili la estontan konstitucion palestinan, ne invitante unu judon. Sed ili konas perfekte la dezirojn de siaj samreligianoj kaj havas tre oftajn interparoladojn kun eminentuloj cionistaj. La konstitucio estonta estas vere tre grava, urĝanta afero; ĉar ĝis nun la palestinianoj nek scias, al kiu nacio ili apartenas, nek havas parlamenton nek ian influon en la administracio de sia lando per delegitoj libere elektitaj. Provizore per elektado de urbaj ĉambroj nur malnovaj turkaj subuloj havas rajton.

La nombro de pilgrimantoj kaj turistoj en Palestino lomete kreskas. Inter aliaj el Kajro (Egiptio) alvenis 45 pastroj gvidataj de profesoroj jezuitaj. De angla militŝipo pli ol 30 oficistoj kaj aliaj maristoj vizitis ĉiujn sanktajn lokojn de Jeruzalemo. Je la mezo de septembro alvenos 30 teologoj de la Biblia Instituto de Roma. P-ro Mallon S. I. akompanos ilin en la vizito de la plej gravaj monumentoj kaj regionoj. Centoj da turistoj amerikaj kaj anglaj intencas viziti la sanktajn lokojn dum la unuaj monatoj de 1922. Grandaj karavanoj da vizitantoj facile obtenas rabaton de 50% en ĉiuj palestinaj fervojoj. Depost mezo de aŭgusto la nombro de trenoj pliiĝis inter Haifa, Jaffa kaj Jeruzalemo. Ankaŭ regula semajna treno permesas viziti Amman, ĉeflokon de Transjordanio, per Samach kaj Deraa.

P. E. S.

LETERO EL POLIO.

Bydgoszcz, sept. 1921.

Dum la lastaj jaroj okazis en ĉiuj ŝtatoj grandaj ŝanĝoj. Unuj renversiĝis, aliaj ekstaris. El

monarkioj fariĝis respublikoj. Kelkaj nacioj liberigis, aliaj ree venis sub tiom pli grandan jugon.

Inter la aro de reaperintaj ŝtatoj troviĝas ankaŭ Polio, ŝtato pro sia nuna terure malalta valuto eble krom Ruslando la plej malfeliĉa ŝtato el ĉiuj. La prezoj ŝanĝiĝas de tago al tago, kaj aĉetante ion hodiaŭ, oni ne scias, kiom oni pagos morgaŭ por la sama objekto. Por mezbona vestaĵo oni devas nun pagi 20000 polajn markojn, por ŝuoj 5-8000 mk. Ne malpli kostaj estas la nutraĵoj. Unu trifunta pano (ekster la marko-sistemo) kostas 125-150 mk., unu funto da butero 350 mk. kaj dekkvino da ovoĵoj minimume 250 mk.

Antaŭ kelka tempo ankoraŭ estis en la iamaj prusaj regionoj de Poznanio kaj Pomeranio la plej moderaj prezoj. Sed depost la 1-a de aŭgusto 1921, la dato de la plena unuigo (unifikacio) de ĉiuj partoj en unu solan ŝtaton kun sola, centra registaro en Varsovio, la prezoj ŝanĝiĝis kun preskaŭ terura rapideco. En la ĉefurbo Varsovio, antaŭ nelonge eble la plej multekosta urbo de tuta Polio, oni vivas hodiaŭ pli malkoste ol en la regionoj de l' Okcidenta Polio.

Pro la multekosteco unu kulpigas alian, la komunumo la registaron kaj reciproke. La laboristo vidas la plej grandan kulpulon en la burĝo, tiu ĉi ree metas la tutan kulpon sur la dorson de la laboristaro. Oni diskutas, parolas, proponas, krias kaj kriadis, sed senefike; la afero ne ŝanĝiĝas, ne, ĝi eĉ malboniĝas!

Memorante la belan antaŭmilitan tempon, kiu hodiaŭ ŝajnas esti ĉarma sonĝo el „Mil kaj unu nokto“ apartenanta al fabelaro, oni pli kaj pli konvinkiĝas, ke — konsiderante Anglion, Francion, Germanion, Pollon kaj Rusion — oni renkontas des pli altajn prezojn, ju pli multe oni alproksimiĝas orienten.

Al la reboniĝo de la valuto en Polio helpus nur tuja reduktado de la granda armeo, kiu dum lasta jaro alportis ne malpli ol 62 miliardojn da deficiito, kaj rapida ekkomenco de komerco kun ĉiuj najbaroj sendiference. El Rusio ekzemple estus tuj riceveblaj multaj vagonoj da kotono. Mankas nur la oficialaj intertraktadoj kun tiu ŝtato kaj la dezirataj komercaĵoj interŝanĝeblaj.

Ekonomia ruino de unu ŝtato signifas hodiaŭ ruinojn de multaj aliaj, kaj povas fariĝi danĝera eĉ por situacio de tuta Eŭropo. Ĉiu ŝtato do devus en hodiaŭaj malfacilaj tempoj en harmonia konsento helpi al la alia, verigante la latinan proverbon: „Manus manum lavat“.

Pola Esp. Servo.

LETERO EL SVISLANDO.

La Kongreso Kooperativa en Basel (Bâle).

Genevo, fino de aŭg. 1921.

La kongreso, kiu ĵus finiĝis, estis sendube unu el la plej interesaj kongresoj, kiuj lastatempe tiel ofte okazas en Svislando. Speciale por ni, esperantistoj, ĝi estas rimarkinda pro tio, ke jam en la komenco kongresano s-o Maxwell esprimis la deziron, ke oni lernu Esperanton. Nuntempe, kiam unu kongreso sekvas alian, fariĝas pli kaj pli evidenta la neceso de la internacia lingvo, kaj jam multaj estas konvinkitaj, ke tiu lingvo estas Esperanto.

La kongreson partoprenis la famekonata franca ekonom-scienculo Charles Gide. Li prezentis al la kongreso rezolucion, en kiu li afirmas unue, ke la efektivigo de la idealo kooperativa estas kunflita kun tiu de la tutmonda paco. Due, la eminenta profesoro diris, ke por meti certajn bazojn de l' tutmonda paco ne sufiĉas transformigoj sole ekonomiaj, ke la principoj altruistaj devas vivi la principon ekonomian, ke la mondo de la praktiko pura ne povas ekzisti sen la lumo de la moralaj principoj. Li finis per la propono al la kongreso, proklami, ke la kooperativanoj devas observi rilate al aliaj homoj kaj popoloj samajn principojn, kiujn ĉiu sincera kooperativano observas inter siaj amikoj.

Ĉu ne estas signifoplena tia aserto en la buŝo de unu el la plej grandaj ekonomistoj? Ĝi estas ankaŭ la voĉo esprimanta la ardan deziron de multaj, de ĉiuj, kiuj sincere klopodas pri vera kooperacio tutmonda.

Paca kaj amika kunlaborado — ĉu ĝi ne estas celo, pri kiu sopiras nuntempe la mondo? Ĝi estas nuntempe la minimumo de aspiroj de la elturmentita homaro.

Oni ne kuraĝas, ŝajne, pli paroli pri frata amo, pri la tutmonda familio, — tro alta, tro neatingebla ŝajnas al ni tiu idealo! Ni kontentigu pormomente per minimuma postulo morala: „Vi ne faru al alia tion, kion vi ne volus, ke oni faru al vi!“

Ni malriĉiĝis morale, ni devas komenci per alfabeto en la moralo. Malgaje, sed ne senespere. Se do ni devas komenci per alfabeto, ni sekvu la deziron esprimitan de s-o Maxwell, kaj prenu la alfabeton esperantan . . .

Ni ne forgesu en nia movado la rezolucion de la granda kongresano, ke homaj rilatoj, kiaj ajn ili estas, estu lumigitaj de la lumo de altruismo, se ni volas ilin starigi fortike. Ankaŭ en nia movado nia granda idealo permesos al la praktiko efektivigi. Vere, la vivo mem montrós al ni, ke la plej praktikaj estos tiuj, kiujn la „praktikuloj“ nomas kompateme . . . „idealistoj“.

Alexandra Mexin.

Recenzejo.

(Lnuope senditajn librojn ni mencias, duoble senditajn ni recenzas. Monataj esp. gazetoj sendu du ekzemplerojn interŝanĝe kontraŭ unu ekz. de nia semajna ĵurnalo.)

LIBROJ.

DUA EKZERCARO de lingvo internacia Esperanto (D-ro L. L. Zamenhof) kun itala traduko. — Collezione della rivista „L'Esperanto“, S. Vito al Tagliamento. 31 pĝ. 12 : 16 cm. Eldonis A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italio) 1921. Prezo: broŝurita 1 lir.

La libreto, destinita por italoj, enhavas la duan ekzercaron de Esperanto kun itala traduko. Ĝi estas tre bone presita kaj povas servi kiel legolibro ankaŭ al tiuj esperantistoj, kiuj lernas la italan lingvon aŭ volas perfektigi en ĝi. (G. Ajul.)

BES-a ADRESARO de Esperantistoj, el ĉiuj landoj. — Tria eldono, somero 1921. Eldonis Bohema Esperanto-Servo en Moravany (Ĉeĥoslovakio). 78 pĝ. 11 1/2 : 14 1/2 cm. Prezo: kartonita 1,50 sv. lk.

La tria eldono de la ĉie konata bonega adresaro ne estas malpli valora ol la du antaŭaj. Precipe atentinda estas la dua parto de la libreto, kiu enhavas la adresaron de la esp. entreprenoj, t. e. la nomaron de la firmaj uzantaj Esperanton, de la esp. servoj (oficejoj, vendejoj, eldonejoj, libretoj kaj informoj), de esp. societoj kaj de la esp. gazetaro. La unuan parton plenigas la adresaro de unuopuloj el la tuta mondo kaj de tiuj personoj, kiuj deziras korespondadi, interŝanĝadi ktp. La libreto estas valora helpilo kaj rekomendinda informilo. (G. Ajul.)

LEGOLIBRO. UNUA VOLUMO: INTERNACIA ANEKDOTARO. De P. William. Nova Esperanto-Biblioteko n-o 7. 64 pĝ. 11 : 15 cm. Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S. 89. Prezo: bone kartonite 5 mk. plus 20% T. (multekosteca aligo). Por eksterlando prezo laŭ valuto.

Kiel la sepan eldonadon de la nova Esp. Bibl. la eldonisto prezentas al ni bonegan legolibron, kiu enhavas okdek zorgeme elektitajn anekdotojn. Abunda vortprovizo kaj granda riĉeco de gramatikaj formoj de l' kompilito uzitaj valorigas la libron speciale taŭgan por ekzercaj rondoj. Preserarojn mi ne trovis. La stilo estas modela. Kelkaj lingvaj nebonaĵoj ekz. mortdirito (laŭfame mortinto), fabrikaĵo (fabrikitaĵo) ktp. malplaĉas, sed ili estas facile forigeblaj en venonta eldono. Al ĉiu instruanto kaj lernanto de nia lingvo mi tre rekomendas la interesan anekdotaron. (G. Ajul.)

GAZETOJ.

DER ARBEITER-ESPERANTIST, 1. sept. Raportas pri novaj lab. grupoj en Hohenstein-Ernstthal, Königsberg, Penig. Kun literatura aldono. La gazeto estas tre bona, sed perfektigo de la stilo estas nepre dezirinda.

LA ORIENTA REVUO. Junio kaj julio. Evidente, nia movado progresas en la lando de la leviganta suno. Precipe en Tokio funkcias multaj kursoj.

THE BRITISH ESPERANTIST. Sept. Enhavas raporton pri la XIII-a.

ACADEMIA PRO INTERLINGUA. Anno 1921. N. 1-2. Senditaj de prof. G. Peano, Cavoretto-Torino (Italio).

SUISIAN IDISTO. Sept. Enhavas raporton pri la I-a Kongreso de Idistoj en Wten.

MUZIKAJOJ.

MIA VERDASTELULINO. Valsa kanto. Vortoj de W. M. Page, muziko de H. Moy Thomas. 2 pĝ. 20 : 28 cm. Germana Esperanto-Eldonejo, Leipzig. The British Esperanto Association, 17, Hart Street, London W. C. 1. Prezo: 6 pencol.

Tristrofa amkanto kun ĉarma rekantaĵo valsforma. La vortoj de ĉi tiu muzikaĵo estas de nia gaja, ĉiam spruile ridetanta angla samideano Page. La rekomendinda ridiga kanto certe estas bonvena okazo de esp. festoj. Notoj de forteplano-muziko. (G. Ajul.)

LA VOJAĈO. Humora kanto originala. Verkita kaj komponita H. Moy Thomas. 2 pĝ. 20 : 28 cm. Germana Esperanto-Eldonejo, Leipzig. The British Esperanto Association, 17, Hart Street, London W. C. 1. Prezo: 6 pencol.

Tiu ĉi kvinstrofa kanto plaĉas precipe al angloj, ĉar la muzikaĵo estas komponita laŭ esence angla maniero. Ankaŭ la teksto estas iom stranga. Mi ne scias, ĉu ne-anglanacianoj ŝatas tiajn humorajojn; eble jes. La muziko estas facile ludebla sur forteplano. (G. Ajul.)

PROSPEKTOJ k. s.

PADOVA KAJ ĜIAJ INTERNACIAJ FOIROJ. Efika scapaga ilustr. prospekto (formato 19 : 27 cm). Havebla ĉe Oficejo Esperanta de Fiera Internazionale di Campioni in Padova (Italio).

POŝTKARTO pri la XI-a Germ. Esp. Kongreso en Breslau. 100 ekz. 5 germ. mk. Havebla ĉe Georg Habellok, Breslau 10, Schielermacherstr. 19.

EISENBÄHNER! LERN! ESPERANTO! (Fervojlatoj! Lernu Esperanton!) Efika flugfolio havebla ĉe Gg. Habellok, Breslau 10 (Germ.), Schielermacherstr. 19.

Gazetaro.

JORNAL DO COMMERCIO (Ĵurnalo de l' Komerco). Rio de Janeiro, 8. aŭg. La plej grava ĵurnalo de Brazilio, enhavas sur pli ol 5 longaj kolonoj 14 tekston de parolado farita de d-ro Arruda Beltrao en klubo de Inĝenieroj pri la lingvo internacia kaj precipe pri Esperanto.

LA VEU DE CATALUNYA, Barcelona, represas „Leteron el Bulgario“ el ET.

DE SOLLICITANT. Hago (Nederl.), 27. julio. Kun „Letero el Bulgario“ laŭ ET, trad. J. van de Velde.

LE PETIT PARISIEN. Paris, 28. aŭg. La plej disvastigita franca ĵurnalo, enhavas artikoleton pri la XIII-a.

LE LYON REPUBLICAIN, grava gazeto de Lyon, 11. julio. Kun dukolona ĉefartikolo de s-o Antonelli, prof. de la jura fakultato de Lyon'a Universitato, pri temo: „Pour que les hommes se comprennent“ (Por ke la homoj interkompreniĝu). La aŭtoro parolas pri la kongreso de la Internacia Komerca Ĉambro en London, kiun li ĉeestis kaj dum kiu s-o Barton Kent, membro de la London'a komerca ĉambro, prezentis raporton pri Esperanto, kaj defendas Esperanton per multe da argumentoj.

L'EXPORTATEUR FRANÇAIS, grava semajna ekiparta revuo de Paris, publikigas en n-o de 1. sept. artikoleton pri la uzado de Esperanto en la komerco kaj diras: „Estas necese taksii la tutan gravecon, kiun Esperanto povas prezenti laŭ la vidpunkto de la disvastigo de franca komerco eksterlande.“

ESSENER ALLGEMEINE ZEITUNG. Essen (Germ.), 5. sept. enhavas notejon, ke holandaj esperantistoj invitis 400 mallortajn saksajn infanojn.

KORRESPONDENT. Organo de la Asocio de Germanaj Prelaboristoj. Leipzig, 18. aŭg. Enhavas komunikon el Paris, ke tie fondiĝis Grupo Esperantista de la Franca Prelaboristaro, 20, rue de Savoie, Paris 6.

RECKLINGHAUSER ZEITUNG. Recklinghausen, Germ., n-oj de 15., 17. kaj 25. aŭg. Kun artikoloj pri la XIII-a, pri esp. kurso en Recklinghausen k. a.

Abonoj al ET.

Ni liveras al ne-germanaj landoj: 52 n-ojn (tuta jaro) por 10 šil., 10 ev. fk., 20 fr. aŭ b. fk., 5 hol. guld., 10 pes., 10 skand. kr., 2 dolaroj aŭ 25 liroj (lirojn ni akceptas nur el Italio); 26 n-ojn (duona jaro) por duona prezo. Al Baliko kaj Balkano ni liveras 26 n-ojn por 25 germ. mk., al Polio 250 pmk., al Finnlando 25 fmk., al Aŭstrio 125 kr., al Hungario 75 kr., al Ĉeĥoslovakio 55 kr.

Oni pagu per monbiletoj aŭ bankĉekoj, sed ne per poŝtaviĝoj, ĉar la poŝto donas parte nur 2/3 de la kurza valoro.

La abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. Germanoj abonu ĉe la poŝto (poŝta gazetlisto, komplementoj 5 kaj 9); kvaronjare 18 mk.

Anoncoj

kostas po kvadratenilmetro 1 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 40% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%).

Anoncetoj

kostas por 1-2foja enpresoj kaj po 25 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-5foja enpresoj ni kalkulas la duoblon. Familiaj anoncetoj (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto) estas senpagaj.

Anoncetoj pri korespondo kaj interŝanĝo

kostas por 1-2foja enpresoj kaj po 15 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-5foja enpresoj ni kalkulas la duoblon.

Germanoj povas pagi monon al nia poŝtĉekkonto: Köln 70865 por Teo Jung, Horrem.

Anoncetoj.

AMO PER PROVERBOJ. Unuakta komedio de Arthur Azevedo. El la portugala lingvo tradukita A. Couto Fernandes. Eldonejo Oskar Ziegler & K-ko, Markt-Redwitz (Germ.). Prezo 3 resp.-kuponoj. Aĉetebla ĉe la tradukinto: Laranjeiras, 225, Rio de Janeiro, Brazilio. — Komedio tre taŭga por la prezentado.

PERVOJISTOJ. O.-G.-V. Ernst Muthschall, Forst i. L. (Germ.), Gubenerstr. 28, sendas 7 belegajn poŝtkartojn ilustr. („Tuck“ pri Halle) kaj 1 fotografadon (submarbato „U 19“) kontraŭ alsendo de fervojaj fakgazetoj (fr., a., ital., nederl., hisp.), regularoj, poŝtk. ktp.

REMIO. S-o Nikola Nedeltscheff, studento, Wienerstr. 60, Darmstadt, Germ., serĉas hemilistajn gekorespondantojn. Interŝanĝas bonvolente kun gesamidednoj ilustritajn poŝtkartojn.

KONGRES-FOTOGRAFAĴOJ. Bone sukcesintaj dummomentaj fotografaĵoj okaze de la inaŭgurado de memortabulo dum la vizito de la esp. kongresanoj en Karlsbad la 9-an de aŭgusto estas riceveblaj de fotografisto Anton Schmolli en Karlsbad, domo „Typographia“. Prezo 4 ĉsl. kr., 6 ekzempleroj 20 kr., 12 ekz. 40 kr., plus sendkostoj.

PETO. Estante en mizera situacio, mi petas gesamideanojn helpi al mi per iu ajn sumeto. Mi estos tre dankema kaj rekompencos ĉion, kiam mia situacio pliboniĝos. Mi estas 3 jarojn en ruĝa militkaptiteco, plene ruiniĝis kaj, veninte hejmen, nun devas multon malhavi. Bonvolu ion sendi al Szekacs Laszlo Pal, Vacz, Bathori-u. 5 (Hung.).

PROPAGANDILOJN ĉiusepece bonvolu sendi por granda propaganda ekspozicio okazonta dum la 11-a Germana Esp. Kongreso 1922 en Breslau al Georg Habelok, Breslau 10 (Germ.): Schielemacherstr. 19. Mi kompensas ĉion sendaĵojn per il. poŝtk. de Breslau.

INĜENIERO-konstruisto-fervojisto, solema, 53-jara, serĉas fakan okupon ĉe ekspluato aŭ konstruo de fervojoj. Dezirindaj landoj por mi estas: Afriko suda aŭ norda, Argentino, Brazilio, Ĉilio, Ĉinio, Jamajka insulo, Urugvio, Aŭstralio, Nova Zelando kaj aliaj ne-eŭropaj landoj. Proponojn oni bonvolu sendi laŭ adreso: P-lando, Tarnow, poste restante, al Inĝeniero Ilya Dobreničenko. Kolegojn kaj samideanojn mi petas helpi min en tiu ĉi afero.

MASINO speciale konstruita por ondigo de ŝtallameno uzota porolveblaj negocfermitoj (jaluzioj) estas serĉata. Adresu proponojn al Inĝeniero M. de Balzac, Via Parini 10, Torino, Italujo.

HUNGARLANDA ESP. SOCIETO invitas al sia ĝenerala Jarkunveno en Budapeŝt (1.-2. okt. en Socia Muzeo, VI, Eötvös u. 5). Amuza kunveno, labora kunsido kaj literaturo festeno. Oni esperas, ke ĉiuj provincoj venos.

EDZIĜO. S-o Rudolf David, Reichenberg (Liberec), Ĉeĥoslovakio, Rollgasse 3, serĉante bonan edzinon, deziras korespondi kun edzinigemaj junulinoj.

Korespondo kaj interŝanĝo.

Manuelo Palomera, Cardenal Casanas 10, Barcelono, Hispanujo, deziras korespondi per poŝtkartoj aŭ leteroj kun la tuta mondo.

S-o Capton, 45 rue Vaneau, Paris, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

Tradukojn (prefereble mallongajn) el la plej famaj naciaj poetoj kaj verkistoj interŝanĝas kun ĉiuj krom Anglujo, Ameriko, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Portugalujo Luigi Puppo, Via del Bragone 1-5, Genova, Sturla, Italio.

C. Fujima, ĉe Bogahuro, 95, Genbei, Pocuka, Tokio Fu. Japanio, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj.

F-ino Trezka Forgon, muzik-akademianino, Debrecen (Hung.), Teleki 54, deziras korespondadi letere pri ĉiuj ajn interesa temo kaj interŝanĝas belajn ilustr. poŝtkartojn.

S-o Hans Wolf, Stuttgart (Germ.), Hahnstr. 60, interŝanĝas poŝtmarkojn por vritemb., bav. kaj germanaj poŝtmarkoj kaj donas poŝtkartojn ilustritajn por poŝtmarkoj.

Mi deziras korespondadon kun ĉiuj landoj per leteroj, ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Joseph Düllmann, Hagen i. W., Germ., Körnerstr. 75.

N. Vigodskij, planludanto, studento de l' supera klaso en Konservatorio, deziras serioze korespondadi kun ĉiulandaj, precipe germanaj samprofesianoj pri diversaj problemoj planitaj kaj komunmuzikaj (esperante, ruse kaj germane). Adreso: Tiflis, Georgio, Konservatorio, Gribojedovskaja 8.

Aleksandro Pilev, Rusujo, Petrogrado, Fontanka 17 deziras korespondi kun 5-anoj el ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. (bildf.) kaj interŝanĝi esp. eldonaĵojn. Povas sendi ankaŭ rusajn naciajn gazetojn ktp.

S-o W. Kaminski, Bydgoszcz (Polujo), Bocianowo 24, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustr. bildf.

Mi deziras ricevi detalajn sciligojn pri ĉiuj ekzistantaj terkulturai kolonioj, moralaj kaj religiaj komunumoj, kiuj celas helpi al morala kaj materiala bonstato de l' homo. Sciligoj estas dezirataj el la tuta mondo. Adreso: B. Duda, Litovujo, Subačius, Maksyvičius Sodz.

Termezuristo deziras korespondadi kun allandaj samfakanoj pri la demandoj de sia profesio, kun aliaj pri diversaj ideoj. Liudas Alseika, Šiauliai, Pasadna 19, Litovio.

S-o Kazis Juozapavičius, 15-jara gimnaziano, korespondas per poŝtkartoj ilustritaj (bildf.). Adreso per Liudas Alseika, Šiauliai, Pasadna 19, Litovio.

5a Internacia Foiro de Frankfurt m.



25. septembro ĝis 1. oktobro 1921.

Importo. 30 branĉoj. Eksporto.



Presadoj en germana, angla, dana, franca, hispana, itala, nederlanda, norvega, sveda kaj esperanta lingvoj.

„Antaŭ-Katalogo“ kun plurlingva kaj esperanta registro, „Listo de Komercadoj“ en Esperanto.

Detalajn informojn petu tuj de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt m. Germ.

Zalbide, Alvarez & Co., Ltd.

London — Bilbao — Rio de Janeiro — Buenos Aires.

Membroj de la Borsoj de Feroj kaj Ŝtaloj en London.

Ĝeneralaĵ vendagentoj por feroj kaj ŝtaloj, metaloj ĉiuspecaj, reloj kaj fervoja materialo, iloj kaj similaj.

Reprezentoj — Komisioj — Maklerado — Konsignoj.

Londona direktoro (s-o Alvarez) vizitonta la Foiron de Frankfurt (fine de septembro 1921) deziras proponojn de gravaj kontinentaj fabrikistoj celantaj reprezentadon en London ĉefe por metaloj, tuboj, fadenoj, lamenoj en ŝtalo, kupro, nikelo ktp.

Ĉiuj ajn metaloj aŭ industriaj materialoj en granda demando.

Skribu tuj (esperante, angle, france, hispane aŭ germane) al la firmo: 5/6 Broad Street House, New Broad Street, London, E. C. 2.

Ĉar ni sukcesis fari interkonsenton kun unu el la plej konataj paperfabrikoj en Finnlando, ni havas okazon proponi al eksterlandaj papervendejoj, pomalgrande kaj pogrande, diversajn

Poŝtpaperojn kaj Kovertojn

Je la prezo de la fabriko. Provkolekton (ĉirkaŭ 100 specialaj poŝtpaperoj kaj kovertoj) ni tuj sendos al vi kontraŭ M. 20.— aŭ Fmk. 16.—. Petu specimenojn kaj kondiĉojn, faru provmendojn kaj vi certe estos kontentaj.

O./Y. MOVADO A./B.
Helsinki, Kasarmink. 20, Finnlando.

UNUJ PAŜOJ

Facila libro por lerneja legado.

Internaciaj rakontetoj, legendoj, proverboj.

Kunmetis kaj aranĝis

Alexandra Mexin.

Mendebla ĝis 15 okt.: Genève, Corsjer Port, deposit 15. okt.: Montreux, 63, Grand'Rue.

Libra kaj Arta Presejo Emil Friedr. Adolph

Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 58.

Fabrikado de bonkvalitaj artpresaj prospektoj kaj de ĉiuj presaĵoj por komerco kaj industrio en ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive Rusa kaj Esperanta.

Oni petu oferton.

Korespondado: Esperante, Anglo, France, Germane ktp.

F-ino Bronė Zemackaitė, Šiauliai, Zemes Ukio Skirius, Litovio, interŝanĝas per poŝtkartoj ilustritaj (bildf.)

S-o Johannes Tamverk, Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bildf.) nur kun fraŭlinoj.

S-o J. Lahtiharju, ad. Mieta, Polvi, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj.

S-ino Hilja Valve, Kausala, Radonsuu, Finnlando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, ilustr. poŝtkartojn de vidindaĵoj kaj pejzaĝoj.

Freiburger Kassenschrankfabrik KARL SCHULER Freiburg i. Br. (Germ.)

Speciala Fabriko por monŝrankoj, libroŝrankoj, nepriŝteblaj ŝrankoj por dokumentaroj, sekretaj murŝrankoj kaj kasetoj.

— Eksporto al ĉiuj landoj. —

Oni petu specialan proponon.

Reprezentantoj serĉataj.

Tre estimataj esperantistoj!

Tre verŝajne multaj el vi legis la anoncon pri la ĉiusemajna ilustrita gazeto

De Prinses

en ET kaj aliaj gazetoj. Tiu ĉi semajna mondo-gazeto ilustrita, redaktita en 5 lingvoj, baldaŭ en septembro ekvidos la vivolumon. Tio donos ion tre gravegan al la esperanta afero. Ke la nova entrepreno estos multekosta por la eldonisto, ne bezonas klarigon, ĉar tiaj eldonaĵoj kostas multe, eĉ tre multe da mono. Tial, subtenu kiom ajn tiun ĉi gazeton, abonu ĝin kaj sendu ankoraŭ hodiaŭ fotojn, ĉiu el sia lando, por ke la gazeto donu al ĉiu ion tre allogan kaj por ke ĝi fariĝu kaj restu vera mondo-gazeto. Tio ja devas esti la deziro de ĉiu esperantisto, sportisto, literaturisto ktp. kaj ankaŭ de la redakcio! Se ĉi volas presigi en nia gazeto anoncon, bonvolu tion frutempe menci al nia administracio.

J. A. Koopman,
kunlaboranto kaj desegnisto de la „Prinses“,

J. J. v. Wensveen,
administranto-korespondanto, Warmoesstr. 118,
Wormerveer, Holando.

Romualdo Colivicchi

Skulptisto

VOLTERRA, TOSCANA, ITALIO.

Premiita laborejo por skulptaĵoj en

Castellina Marmoro (Alabaŝtro).

Specialaĵoj:

Polikromataj artist-laboraĵoj, lampoj, vazoj, objektoj por elektra iluminado.

Ĉiuspecaj artist-laboraĵoj estas ĉiam preperataj. Oni deziras agentojn kaj reprezentantojn en ĉiuj landoj.

— Oni korespondas en Esperanto. —